

Babilado kun René-William Perrenoud, II.

Radioprelego de Claude GACOND, SRI, 1985 januaro 10 kaj 12.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-137/Radiokasedo-137-2-862-1985-Claude-GACOND-Babilado-kun-Rene-William-Perrenoud-II.mp3>

Cl.- Vi aŭdas elsendon de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ Claude Gacond diskutos kun René-William Perrenoud, la plej malnova aktiva esperantisto de Svislando. En decembro ni jam havis la okazon aŭdigi al vi elsendon, kiun ni realigis okaze de la 80-jariĝo de tiu denaska esperantisto. Kaj li rakontis ĉefe pri sia junaĝo, siaj lingvaj studoj kaj enprofundiĝo en la studo de esperanto. Antaŭ ol daŭrigi nian babiladon kun tiu kunlaboranto de Kultura Centro Esperantista, kiu prizorgas ekde 1968 la librotenanadon de tiu pli kaj pli grava institucio, ni rememorigu kelkajn karakterizaĵojn de lia vivo. René-William Perrenoud naskiĝis en Le Locle, urbeto najbara al La Chaux-de-Fonds, en esperanto-familio, kaj li bone memoras pri esperantistaj renkontiĝoj okazintaj antaŭ la unua mondmilito. Antaŭ ol fariĝi dum tridekkvin jaroj direktoro de privata lernejo por junulinoj lernantaj la francan lingvon kaj la dommastrumadon, li studis en la Universitato de Neuchâtel, en Germanio kaj Bazelo kaj sekretariis dum ses jaroj en la direkcio de fabriko en Francio.

S-ro René-William Perrenoud, pro viaj restadoj en germanlingvaj teritorioj, vi estas unu el tiuj maloftaj franclingvaj svisoj, kiuj bone konas la germanan lingvon. Kaj tio treege utilas al la svisa movado, ĉar vi povis tiel transpreni la kompleksan taskon francigi la informojn pri esperanto, kiun d-ro Arthur Baur redaktas sub la titolo Esperanto Information por la germanlingva publiko. Ekde kiam vi nelacigeble plenumas tiun tradukfunkcion?

RWP.- Mi ne retrovis la precizan daton, sed antaŭ ĉirkaŭ dudek jaroj.

Cl.- Ĉu vi havas aliajn regulajn kontaktojn kun la germana Svislando.

RWP.- Nun mi loĝas en la vilaĝo Hauterive, apud la urbo Neuchâtel, kaj fakte kvin kilometrojn de ĉe ni, trans la rivero Thielle, kiu nomiĝas Ziehl en la germana, kaj kiu eliras la lagon Neuchâtel, troviĝas vilagoj, kie oni parolas akran dialekton germanan. Mi povus min komprenigi per miaj konoj de la germana, sed se mi provus esprimi min kiel ili, ili ridus plengorĝe! Ĉar ekzistas almenaŭ kvindeko da malsimilaj dialektoj germanaj uzataj en nia lando. Estas tute vane postuli de franclingvanoj lerni la lingvon de la najbaroj. Se en mia junaĝo kaj ankoraŭ ĝis antaŭ dudeko da jaroj estis kvazaŭ devo por la junaj svisoj efektiviĝi lingvan staĝon en alilingva regiono, tio estas konsiderata kiel ne plu necesa nuntempe. Ke la lingvaj problemoj komplikiĝas por ni franclingvanoj, ĉar la germanvisoj pli kaj pli praktikas la alemanajn dialektojn ĝis en la universitataj medioj. Eble foje esperanto fariĝos lingva ponto por rilatigi pli simple kaj pli racie la diversajn regionojn de nia federacia lando, ŝparigante multajn horojn de la studplanoj de niaj lernejoj. Kiuj poste bezonos koni fremdan lingvon, tiuj pli facile ĝin eklernos, kiam ili povos per esperanto rilati kun la alilingvanoj. Tiu mia konvinko baziĝas sur propraj spertoj.

Cl.- En la monato decembro vi raportis, ke via enprofundiĝo en la studo de esperanto estas iel ligita kun la dua mondmilito.

RWP.- Jes, kiam mi veturis al la ofico, kie mi militservis je la komenco de la dua mondmilito, en 1939, mi metis en la poŝon la lernolibron de Edmond Privat. Pli poste, en 1951, mi sekvis esperanto-kurson, kiun gvidis d-ro William Perrenoud. Li eksperimentis tiam propran metodon, kiun li titolis "En tempo rekorda".

Cl.- Ĉu d-ro William Perrenoud, la aŭtoro de la metodo, kiu nomiĝis poste La Ora Metodo estas parenco de vi? Vi havas saman familian nomon, Perrenoud, kaj ambaŭ vi naskiĝis en Le Locle.

RWP.- Ne. Fakte ekde la 15-a jarcento tri branĉoj de Perrenoud-familioj ekzistas. Kaj ili ne plu konas la aliajn. Sed okazas foje konfuzoj fare de la poŝtistoj.

Cl.- La venontan semajnon mi kaj mia edzino parolos pri William Perrenoud, kiu mortis fakte fine de la pasinta jaro. Vi sekvis lian kurson en 1951, kaj mi kaj mia estonta edzino ni frekventis lian kurson en 1952. Se mi ne eraras, d-ro William Perrenoud reorganizis la esperanto-grupon en la sama periodo.

RWP.- Jes, kaj estas li, kiu enirigis min en tiun grupon, en kiu mi transprenis la taskon de kasisto kaj sekretario en 1953, kion mi ankoraŭ faras post 31 jaroj. Sed tiu funkcio estis avantaĝa por mi, ĉar mi ricevis ankaŭ la taskon zorgi pri la grupa biblioteko. Mi tiel profitis dum la jaroj preskaŭ ĉion legi. Kiam d-ro William Perrenoud estis elektita por estri la Svisan Esperanto-Societon, li alektis min por la verkado de la protokoloj kaj ankaŭ por zorgi pri la kaso. Tion mi plenumis de 1952 ĝis 1974, do dum 22 jaroj. Komence mi timis prezenti tekstojn kun eraroj, pro tio mi submetis al d-ro Perrenoud miajn malnetojn petante korektojn. Sed li tion tiel zorgplene plenumis, ke preskaŭ ĉiu vorto estis anstataŭita aŭ korektita per ruĝa inko. Mi iom post iom venis al pli facila verkado.

Cl.- Okazis al mi iom simile, ĉar en tiu tempo mi respondecis pri la junulara sekcio. Ankaŭ per la korektoj de miaj projektoj kaj raportoj mi multon lernis.

RWP.- Intertempe naskiĝis la Kultura Centro Esperantista, la 15-an de decembro 1968, en la dulingva urbo Biel-Bienne. Formiĝis direkta komitato trimembra. Mi eniris ĝin kun vi kaj kun d-ro August Braun, mia najbaro en la vilaĝo Hauterive. Kiel spirita heredanto de Edmond Privat, vi pretiĝis dediĉi vin al la realigo de liaj planoj, kaj mi helpis vin notante paŝon post paŝo la ĉiutagajn klopodojn kaj frankon post franko la donacojn kaj la elspezojn. Kun mia najbaro August Braun ĉiusemajne ni veturis aŭtomobile al via montara vilaĝo La Sagne, kie ofte ĝis noktomezo ni kune okupiĝis pri la aferoj kaj projektoj de Kultura Centro Esperantista. La vojo transiras pasejon je preskaŭ 1300 metroj kaj ofte pro pluvo, nebulo, neĝo aŭ glacio, la veturado fariĝis riska aventuro.

Cl.- Kaj en la jaro 1974 tiuj kunsidoj ekdisvolviĝis en La Chaux-de-Fonds, en la unua loĝejo de la estonta Gastejo Edmond Privat.

RWP.- Jes, kaj la librotenado pliampleksiĝis per la administrado de la domaro kaj pro la multnombraj transformlaboroj, kiujn ni efektivigis paralele al la organizo de kurssesioj. Komencis alkuri lernantoj, staĝuloj, gastoj kaj feriantoj. Jen granda aventuro nun deksepjaraĝa.

Cl.- Kaj mi esperas, ke ĝi povos pludaŭri ankoraŭ multajn jarojn. Kiel eksdirektoro de privata lernejo vi ĉirkaŭigis nin ne nur per utilaj, sed per kompetentaj konsiloj. Kaj sen via grandega laboro tutcerte ne ekzistus nun Gastejo Edmond Privat.

RWP.- Jes, mi fidele plenumis la funkciojn, kiujn mi ricevis. Eble foje nia Kultura Centro Esperantista ne estos utila nur al la esperantistaro, sed ankaŭ al la svisaj civitanoj. En nia malgranda plurlingva lando ni povus pruvi per lokaj agadoj la utilecon de tia helplingvo, kia estas esperanto. Laŭlonge de la lingvaj limoj ni povus instigi al komunaj aktivecoj de societoj ĉu kulturaj aŭ sportaj. Per komuna instruado foje ĉe franclingvanoj, foje ĉe germanlingvanoj, ni kreus tiel tute naturan kutimon praktiki esperanton kun alilingvanoj, tute simple, kiel mi faras en Hauterive kun mia germanlingva najbaro d-ro August Braun, kiu prezidis ĝis novembro 1984 la direktan komitaton de Kultura Centro Esperantista.

Cl.- Tiu realigota projekto bele konkludas nian hodiaŭan babiladon kaj montras, ke okdekjara vivo lasis vin kun rigardo turnita al la estonteco. Tio estas tre verŝajne la sekreto de via eterna juneco.

Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude Gacond dikutis kun René-William Perrenoud, la plej malnova aktiva esperantisto en Svislando. Ĝis reaŭdo!